

(Finota.)

Korekto.

En la fellefono de n-o 136, pago 1, kol. 1, atineo 3,
linio 7, legu „enpakalo“ anst. „cupokalo“

objektiveco kaj propra meditado. Ni povas esperi, ke fine — post ĝenerala enkonduko de Esperanto — tiu stato ŝanĝiĝos, ke internaciaj ĵurnaloj, ekzistantaj per internacia kapitalo kaj redaktataj de internaciaj ĵurnalistoj en internacia lingvo, ne timos diri la veron al siaj legantoj, ke la senpera interkomprenado de la popoloj, buŝe kaj skribe, forpelos aŭ almenaŭ malfortigos la mensogojn kaj kalumniojn, kiujn nun registaro de unu lando disvastigas pri „malamika“ nacio. Tamen provizore la malinda stato ankoraŭ restas, kaj ni devas kalkuli je ĝi. Nial aerpalacoj ne jam konstruiĝis, nia „bela sonĝo“ ne jam efektiviĝis por „eterna beno“ malproksimega estas ankoraŭ la Ora Epoko, ekzistas ankoraŭ mensogo kaj kalumnio, malbenon portantaj ĝemeloj el Infero, detruantoj de amo kaj paco. Nur estus dezirinde, ke almenaŭ la Esperantistoj estu pli toleremaj, pli meditemaj, malpli akceptemaj kontraŭ mensogo kaj kalumnio. (Mi celas la Esperantistojn en ĉiuj landoj.)

Mi ne volas forgesi, ke de alia francaj samideanoj mi ricevis aprobojn pro mia firma neŭtraleco; ili plene konfesas la malfacilegan taskon de ĉefredaktoro de Esperanta ĵurnalo, precipe dum tempo kiel la nuna. Efektive, mi havas sufiĉe da zorgo sane elkonduki la ŝipon de „Esperanto Triumfonta“ el la nuna situacio plena je danĝeraj rifoj kaj profundegaĵoj: la politika krizo, la terura plikariĝo, la nefunkcio de fervojoj, la malfacileco ricevi menditajn maŝinojn, presliterojn, paperon ktp., la malrapida irado de la poŝto kun prokrasto de gravaj leteroj, novaĵoj, gazetoj, la manko de taŭga „vicedraktoro**“ — ĉio ĉi ege malfaciligas mian taskon, kaj se kelkaj legantoj ankoraŭ pli-malfaciligas ĝin per akraj atakoj nemerititaj, per riproĉoj kaj senencaj plendoj, tio ne povas ne ĉagreni min.

Havu do iom da konfido je la sincereco de l' ET-redaktoro! Kaj kiam foje li eraretas, montru iom da toleremo — li ja estas ankaŭ nur homo!

De nun mi laŭble evitos aludi en iu artikolo aŭ artikoleto la Ruhr-konflikton; sed mi petas insiste, ke ankaŭ la legantoj nun silentu pri tiu temo. Francoj aŭ belgoj ne postulu de mi neblajon (ekzemple, ke mi zorgu ke la registaro en Berlin cedu en la Ruhr-konflikto), sed ankaŭ germanoj aŭ germanamikaj neŭtraluloj ne postulu publikigon de protestoj aŭ artikoloj unuflanke partiaj (ekzemple, ke oni bojkotu la francan popolon, k. s.).

Ĝis nun mi vivis en plej bona interkonsento kun la legantaro de ET; ĝis nun oni ne dubis pri la sincera neŭtraleco de ET. Ĉu la Ruhr-konflikto nin disigu? Se vi silentos pri la temo, tio estos por mi la plej komprenebla respondo.

T. J.

**) Volonte mi dungus spertan francan samideanon kiel „vic-redaktoron“; sed ĉu iu franca samideano akceptos?

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Aŭstralio.

En Melbourne oni faris — okaze de koncerto por festi la naskotaglon de D-ro Zamenhof — mon kolekton por la Monumento al la Majstro, kiu rezultigis 5/5/- £.

Aŭstrujo.

Esp.-Unio en Lebben donacis 50 000 aŭstr. kr. por helpo al Ruhrdistrikto.

Belgujo.

En Liège fondiĝis „Provinca Komitato por disvastigo de Esperanto“; prez. s-o Jos. Pirnay en Verviers. Dum la ĝenerala kunveno, 25. febr. oni priparolis la venontan belgan kongreson, kiu okazos supoze en Spa.

La Liège'a Socialista Esp. grupo aranĝis festeton 24. febr. antaŭ pli ol 100 ĉeestantoj. Kursoj regule funkcias en la popoldomo.

Bulgarujo.

Estas konate, ke la Esperanta movado en Bulgario jam en la unuaj jaroj ludis rolon. Nun ekzistas ĉe 3,5 milionoj da logantoj 40 grupoj. (Ĉe sama proporcio devus havi Britujo 560, Francujo pli ol 400, Germanujo 640, Usono 1160 grupojn!) En pli ol cent urboj kaj vilaĝoj oni povas interkompreniĝi per Esperanto. En 40 mezlernejoj Esperanto estas ne devige sed oficiale instruata. „Bulgara Esperantisto“ eldonos albumoadresaron de bulgaraj Esperantistoj.

En Tirnovo oni preparas la X-an bulgaran Esp.-kongreson, 12. julio. Vigla Esp. vivo en Tirnovo promesas bonan aranĝon.

Brazilujo.

Gravajn decidojn faris dum lasta tempo: La Brazila Parlamento, la 1-a kongreso de la braz. komercaj asocioj, kaj la 2-a amerika kongreso de ekonomia disvastigo kaj komerca instruado. Pro manko de loko ni represos ilin nur en venonta numero.

En Rio de Janeiro okazos la VII-a Brazila Kongreso de Esperanto, 9.—14. marto. La Ministro de Publikaj Laboroj permesis, ke la organiza komitato telegrafu senpage ĉien en Brazilujo.

Ĉeĥoslovakujo.

La Komerca Akademio en M. Ostrava enkondukis nedevige instruadon de Esperanto. S-o Janečka instruas 36 gelnantojn.

La Ministerio de instruado permesis instrui Esperanton en ĉiuj burĝaj lernejoj de „Granda Ostrava“. Por la instruado estas komisiita ŝtate ekzamenita s-o Janečka, kiu gvidas nun 6 kursojn kun eniute 134 partoprenantoj.

Estonujo.

En Narva nova kurso en la loka komerca lernejo.

En Tallinn kurso por 20 ĝeinstruistoj. Laŭ peto de lernantoj komencis nova kurso en elementa lernejo. S-o Rosenberg aperigas Est.-Esp. vortaron. Baldaŭ aperos ankaŭ lernolibro por estonoj.

En Tartu nova kurso por 29 lernantoj ĉe la Akademia Esp.-Klubo.

En Valk la grupo akceptis 11 novajn membrojn dum la jarkunveno.

Germanujo.

En Berlin la kunvenoj de nun okazos ĉiun trian mardon monate en la helmo de „Schriftsteller-Verband“ (unuigo de verkistoj) Kurfürstenstrasse 11/1. Je la 7-a vespere.

En Potsdam 2 kursoj funkcias en „Volks-hochschule“ (popola altlernejo). La grupo preparas la pentekostan kunvenon de la „Märk. Pomm. Esperanto-Verband“. Diversaj aranĝoj, inter kiuj vizito al la stel-observejo allogos multajn gastojn.

Hispanujo.

Kongreŝo de lberaj Esperantistoj okazos en Valencia venontan majon.

La Vaska Federacio laboras vigle. En Bilbao en publika lernejo „Berategui“ 80 knaboj kaj 14 knabinoj partoprenas liberan Esp. kurson.

En Andaluzio la movado prosperas; samideanoj agas en Jerez, San Fernando, Górdoba, Tocina, Villanueva de las Minas, Santander kaj Madrid.

Majoro Mangada Rosenörn gvidis kurson por oficiroj en ĝenerala tiendaro de Dar-Quebdani.

Kanado.

Jarkunveno de Esp. Societo Toronto okazis la 4. jan. Nova estraro elektita (prez. D-ro Louis Allen, ĉe universitato de Toronto). — Nova grupoito kunvenas en helmo de D-ro Watson. — Kursetoj de D-ro Allen kaj f-ino Algje.

Latvujo.

En Riga depost la XIV-a 10 ĵurnaloj regule favore raportas pri Esp. Inter ili „Latvijas Sargs“ jam de 4 monatoj havas ĉiutagan Esperanto-angulon kaj aliĝis kiel entrepreno al UEA. Riga Esp. societo eldonis laivan priesperantan broŝuron dissidentan al multaj aŭtoritatoj.

Fondiĝis nova polic-Esperanta societo.

La Ministrejo por internaj aferoj oficiale kaj per monhelpo subvencis Esperanto-kursojn de fervojaj policistoj.

Nova kurso por oficistoj de la Financ-Ministrejo.

Nederlando.

En 's-Gravenhage okazis jara ĝenerala kunveno de la Anonima Societo „Centra Esperanto-Librejo. Dividendo 5½%. S-o J. L. Bruyn reelektita komisaro.

Nijnij-Novgorod (Ruslando).

(Kvankam tiu ĉi raporto estas detalega, ni preas ĝin plene, ĉar ĝi prezantas ekzempleron pri la nuna labormaniero de de Esperantaj grupoj en Ruslando ĝenerale.)

La 8-an de januaro okazis jara kunveno de N.-Novgoroda Grupo de Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo. La kunveno aprobis la raporton pri la jara agado de la grupo dum 1922 kaj finn de la kasisto, esprimante sian dankon al la estraro, bibliotekisto kaj forveturonta s-o Varankin. Estis akceptata nova regularo kaj planoj de laboro por 1923. La nova komitato konsistas el predikanto s-o Konovalov H., vic-prezidanto s-o Belaiev L., kasisto s-o Vinogradov S., sekretario s-o Sokolov T., kaj el la membroj f-ino Kitaleva A. kaj s-o Moisejev V.

Jen konciza ekstrakto el la jara raporto: En komenco de pasinta jaro N.-N. Esperanta klubo pro la nova ekonomia politiko de la registaro estis senigita de la ŝtata helpo kaj devis eklabori memstare en la formo de grupo de SEU. Spite al nealkutimiĝo al la novaĵ agadformoj, nesufiĉa aktiveco de la membroj kaj manko de monrimedoj la grupoj tamen sukcesis ion fari. Propagandcele okazis prelegoj pri Esperanto dum 4 publikaj Esperant-rusaj spektakloj, aranĝitaj de la grupo. Krome oni propagandis per loka gazeto, publikante diversajn notojn pri Esperanto kaj artikolojn, tradukitajn el „Sennacieca Revuo“ Ankaŭ estis gluitaj en la stratoj efikaj afiŝoj. Printempe funkciis kurso kun 20 personoj. Aŭtuna kurso kun 30 personoj okazis en kadro de Esperanta Sekcio ĉe Centra Laborista Klubo. Pri tiu sekcio jam estas raportita en ET. Regule funkcias la tutan jaron Esp. biblioteko kaj estis disvendata granda kvanto da Esperantaj titoloj. Ĉiusemajne estis kunvenoj de la membroj, dum kiuj oni sin okupis per literaturaj pridiskutoj, kolektivaj tradukoj el rusa lingvo, kolektiva korespondado kun eksterlandaj legendo de Esperantaj gazetoj, perfektigo en la lingvo per preparado de Esperantaj spektakloj. De novembro tiuj ĉi kunvenoj okazis en ejo de C. Lab. Klubo kune kun la membroj de tiea Esperanta Sekcio.

Por 2-a Kongreso de SAT la Grupo sendis sian delegiton, kiu bedaŭrinde povis veni nur ĝis Danzig. Dum la jaro la komitato kunsidis 20-foje kaj okazis 3 ĝeneralaj kunvenoj. Finante, la raporto esperas, ke la sperto de pasinta jaro estos bone utiligita kaj la laboro de la grupo en 1923 estos pli fruktodona.

Organizaĵoj kaj personoj dezirantaj teriritati kun la grupo turnu sin laŭ la adreso: s-o Konovalov H., Tetrlnaja pl. 6, 9, Nijnij-Novgorod, Rusio. Pro la alta poŝtarifoj oni bonvo'u aldoni por respondo egalvaloron de 0.50 sv. fr. La grupo tre deziras interŝanĝi opiniojn pri metodoj de Esperanta agado en- kaj ekstergrupa.

Svedujo.

En Karlskrona nova kurso kun 25 partoprenantoj.

Svislando.

La 21. febr. okazis en „Bürgerhaus“ (burĝa domo) en Bern lumbilda parolado pri „Mondlingvo kaj ĝia praktika uzado“, de s-o Jules Perlet. Tiu propagando (por Esperanto per lumbildoj) estas tute originala. La bildoj montras ekzemplojn el la gramatika de Esperanto, scenojn de Esp. kongresoj, reproduktiojn de Esp. gazetoj kaj prospektojn de foiroj kaj firmoj uzantaj Esperanton, ktp. La publiko ne ĉestis grandnombre, sed montris sufiĉe da intereso. Anoncis sin kelkaj personoj por kurso. Oni faris monkolekton, kiun oni donacos parte por „Esperanta Ligilo“. Pri la parolado raportis la tagĵurnaloj. Ni ricevis detalan raporton de s-o Bolliger, vicdel. de UEA, sed pro manko de loko ne povas ĝin plene publikigi.

Je la fino de sia raporto s-o B. skribas:

„Laŭ la unua sperto farita per tiuj ĉi interesaj lumbildoj mi konstatas, ke ili sendube estas la plej bona kaj konvinka propagandilo. Ĉar pli ol 120 diapozitivaj diversspecaj estas pretaj, estus konsilinde al Svisa Esp. Societo aĉeti projektilon, kiu estus je la dispono de niaj svisaj grupoj. La redakciojn de eksterlanda gazetaro, komercajn firmojn fakte uzantaj Esperanton, instruistojn, kiuj faras fotografaĵojn de Esp. klasoj ktp., mi petas sendi al nia propagandisto s-o Jules Perlet, Gutenbergstr. 31, Bern, nur taŭgan materialon. Niajn grupestrojn mi povas sciigi, ke s-o Perlet sin deklaris preta ankaŭ paroladi en ilia urbo.“

Usono.

En Boulder (Colorado) s-o Buchheim gvidas kurson de 48 gelnantoj.

En Philadelphia la 9. dec. 1922 s-o H. W. Hetzel parolis pri Esperanto dum 25 minutoj de la Gimbel Bros. „broadcasting“ radiostacio WIP. Pro ĝi la societo ricevis kelkajn informpetojn pri Esperanto. La 17. dec. parolado de l' sama samideano ĉe „Friendship Liberal League“.

Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis: 242. Teo Wiczorek, Brynow 2000 mk.

Scienco.

Hispana-Portugala Kongreso pri Sciencoj.

Dum proksima junio okazos en Salamanca, sub aŭspicioj de Salamanca Universitato, Hispana-Portugala Kongreso pri Sciencoj. Taŭga okazo por propagandi Esperanton inter sciencistoj, per raporto prezentinda, ĉu de I. S. A. ĉu de alia organizo. D-ro Roberto *Maraury* (Villaruel 19, Salamanca) kiel kongresano, volonte legos tradukon en kunsido, sed estus preferinde, ke eksterlando D-ro ĝin legu antaŭe Esperantlingve. Eksterlandaj samideanoj, kiuj intencas partopreni la kongreson, bonvolu sin turni al D-ro Maraury.

Preseraroj.

En la artikolo pri Röntgen † en n-o 126 estis jenaj preseraroj:

Alineo 1, linio 11: procetoj (anst. procedoj)
16: galvanismo (anst. galvanismo)
21: kun efikas (anst. kunefika)
59: prikologia (anst. psikologia)
Alineo 2, linio 6: elektromgneismo (anst. elektromagnetismo)
9: krakteriza (anst. karakteriza)
11: ŝiruuloj (anst. ŝirmiloj)
Alineo 6, linio 11: obzervoj (anst. observoj)
Alineo 11, linio 10: homoj (anst. homoj)

La presprovaĵo de n-o 126 estis legita de nova korektisto, tio ion senkulpigis nin. Bedaŭrinde la ĉefredaktoro ne povas mem legi la presprovaĵojn, kaj estas malfacilege trovi nuntimpe perfektan Esperantiston, kiu samtempe estas nepre fidinda korektisto. Ni faros, kion ni povos, por estonte eviti laŭble la preserarojn, sed la preserara diablo ja estas konata kiel malicegulo kaj obstinulo, kaj tuta li ne estas estingebla.

Internacia Sporto.

Aviado.

Konkurso de senmotora aviado okazos la 3—31. aŭg. en la germana montaro Rhön. Krom el Germanujo kaj „neutralaj“ ŝtatoj, oni atendas konkursontojn ankaŭ el Britujo kaj Ameriko.

Piedpilk.

Germana Pp. Klubo Prag kontraŭ Gimnastika Unuiĝo Fürth (de 1860) 13:1.

Boksado.

Angla mezpezulo Roland Todd venkis Tod Kid Lewis, la mezpezan majstron de Anglujo kaj Eŭropo, en 20 rondoj.

Diversaĵoj.

Francaj pasportoj.

La franca pasportvizo estas forigita por multaj landoj, inter kiuj troviĝas Granda Britujo.

Nederlanda vizo forigita.

Laŭ reciproka konsento de la brita kaj nederlanda registaroj decidigis forigi de la 15-a de februaro la vizon sur la pasportoj de britujanoj dezirantaj eniri Nederlandon kaj nederlandanoj dezirantaj eniri Britujojn.

Ligo de Nacioj.

Subkomitato pri intelekta kunagado.

La subkomitato pri bibliografio esploris la demandon, ĉu oni ne povas kunordigi la multlokaajn penojn de la organizaĵoj en diversaj landoj, prepari kaj presigi resumojn de scienca verkado. Tiamaniere malŝparo de laboro eviiĝus, kaj per sistema labordividado pli kompleta analiza bibliografio de ĉiu el la sciencoj estus garantiata. Tiu sama komitato ankaŭ ekzamenis proponon faritan de Prof. Bergson por la fondo de unu (aŭ pli ol unu) internacia biblioteko ricevonta ekzemplerojn de ĉiu publikigaĵo en ĉiu lando. Oni opinias, ke tia biblioteko estos fondebla je malgranda kosto per la enkondukado de la sistemo de devigata deponado de verkoj.

(Laŭ „Daily Telegraph“.)

Pri la gazetara demando.

Nur en lastaj tagoj alvenis opini-esprimoj de naŭ diversaj landoj pri la artikolo „Aktualigi nian semajnan gazeton“ de s-o Hevesi en ET 124. Parte ili enhavas bonegain pensojn kaj instigojn. Ne volante kaŝi ilin antaŭ la okuloj de la legantoj por ke oni ne opiniu, ke ni timas la kritikon, sed ankaŭ ne volante plu oferi lokon por tiu temo en ET (vidu nian artikolon en n-o 126), ni presos la pli gravajn el la ricevitaj opinioj senkomen-tarie sur aparta folio, kiun ni aldonos al n-o 129. (Al n-o 128 estos aldonata la marta „Revuo“.) Poste tiu temo restu provizore ne plu tuŝata, kaj ni malpli parolu, sed agu!

Gazetaro.

Rigasche Nachrichten. 16. 2. (Esp. kroniko)
Pester Lloyd. 5. 2., Nep. Világ. 11. 2. en Budapeŝt raportis pri Venezia Konferenco.
Pester Lloyd, kaj Magyaraság, Budapest, 11. 2. (Pri Nürnberga Kongreso kaj Lit. Mondo.)
Vasvármegye, Szombathely, 11. 2. (Pri Nürnberga Kongreso, Lit. Mondo. Barcelona Foiro, Zamenhof-Monumento kaj Brazilo Decido.)
Berner Tagblätt de 23. 2., Der Bund de 24. 2. kaj Neu-Berner Zeitung de 26. L. raportis pri lumbilda parolado de s-o Perlet pri Esperanto.
Rigasche Nachrichten, Riga, Letv., 27. 2. (Esp. kaj foiro.)
Latvijas Sargs, Riga, 28. 2. (Art. Esperanto un ldo“, kaj anonco pri Esp. broŝuro.)
Plamienie, Kraków, jan. (Artikoloj pri Esp. Kongreso en Helsinko, Esp. kaj Ligo de Nacioj, de S. Kornfeld.)
Roma Salus, Roma, jan. (Esperantema revueto.)

Recenzejo.

LIBROJ.

DU KOKCINELOJ, kaj LA MONIRO. De Géza Gárdonyi Tradukis D-ro Kolomano de Kalocsay. Rekomendita de ELA. 32 pag. broŝuro. Prezo 1 resp.-kup. aŭ 0.25 svis. fk. Eldonejo: Budapeŝt VI, Hajos-utca 15. II., Hungarlando. „Du kokcinejoj“ estas ĉarma rakonto el la hungara literaturo, lerte tradukita en bona, facile komprenebla stilo. „La moniro“ estas etaĵo. Enestas kelkaj gravaj preseraroj: aparteltoj (anst. apartaj), ŝi (anst. li) dufoje li (anst. ŝi), unufoje li (anst. ŝi), kaj aliaj malpli gravaj. Ofte mankas la supersigno. Nekutimaj vortoj aŭ esprimoj: ambli, ŝumbli, ĵmpele, langvore. Nekutima estas ankaŭ la uzado de „ke“ por montri rerektaĵn parolon. Malbona vortodisigo: porkp-aŝtiso — Post forigo de tiuj mankoj en dua eldono la libreto e tus rekomendinda kiel facila ĉarma legaĵo, precipe por komencantoj. (R-ano.)

VORTARO de la oficialaj radikoj de Esperanto. De Th. Carr. (Kolekto de la Akademio.) 32 pag. broŝur. Prezo 0.50 svis.fk. por malbonv. luuloj 0.50 gmk. X ŝlosilnumero. Eldonejo: Eljesiek & Borel, Berlin S. W. 61. Wilms Str. 5. La Esperantistaro certe kun ĝojo salutas la ap-on de tiu ĉi libreto, kiu enhavas la plenan gramatikon de Esperanto kaj pli ol 4000 radikojn. La radikoj de l' Fundamento estas stelsignitaj. Malpli gravaj radikoj estas kursive presitaj. Enestas kelkaj preseraroj: diud' anst. duel', duel' anst. duet', stalaglit' anst. stalaktit', turl' anst. turb', kaj en la noto 1 sur pg. 31: kiom anst. kiam.

KOREKTO de la eraraj tradukoj en „Universala Vortaro“ (kun aprobo de L. K.). Germana parto. 8 paĝoj litografitaj. Prezo 0.50 svis. fk., por malbonv. 0.50 gmk. X ŝlosilnumero. Eldonejo: Eljesiek & Borel, Berlin S. W. 61.

GAZETOJ.

Hungara Esperantisto. Febr.
Vegetarano. Jan. Adr.: Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrug-chaussee 586.

Enhavo bona kaj laŭfaka. Rekomendinda al Esp. vegetaranoj. [Strangaj estas urbnoj] kiel Lipsio, Munheno k. a. ne troveblaj sur iu geografia karto; ĉu oni ankaŭ skribos Krojdn anst. Croydon, Bove anst. Beauvais ktp.? Menciante la artikolon „Koncestrigo de la Esp. fortoj“ ni denove deklaras nian vidpunkton, ke fakaj gazetoj estas dezirindaj kondiĉe ke ili havu sufiĉe da rimedoj por sia ekzistado.

La verserĉanto. N-o 1.

Kvankam tiu ĉi nova revueto aperas kiel bulteno de sveda vegetarana societo „La Gefraibando“ en lingvoj sveda kaj Esperanta, ni demandas nin, ĉu ne sufiĉas „Vegetarano“ por la ankoraŭ ne tro forta vegetara movado Esperantista.

Svenska Arbetar-Esperantisten (Sveda Laborista Esperantisto). Febr.

Espero Teozofia. Nov. dec.
The British Esperantist. Febr.
Esperanto. Febr. Kun aldonita „Bulteno de la Int. Labora Oficejo“.

Holanda Esperantisto. 15. 2.

Teristo. Nov. dec.

Informa Bulteno de Orienfranca Federacio. Febr. Hektografita.

PROSPEKTOJ k. s.

INVITILO por vizito al Printempa Foiro de Frankfurt (15.—21. aprilo 1922). Kun avizo de vizitonto. En Esperanto, bele presita. Vizitiontoj, precipe el eksterlando, tuj postulu ĝin de Messamt (Foir-Oficejo), Esp. Fakoj, Frankfurt a. M.

Leterkesto de ET.

A. D. A. en Sofia. — Dankon pro manuskriptoj. Ili certe aperos, kiam estos loko.

T. W. en Brynow. — Dankon pro donaco por la blinduloj. Via abono dauras ĝis 150.

V. P. en Karvina. — Pri poŝtkalendaro bonvolu vin turni al Butin & Jung en Godesberg a. Rh. (Germ.)

Studento en Brno. — Unue la sendita mono ne sufiĉas por anoncoj ĉar ni ricevis nur la valoron de krĉ. 2.80. Due ni ne povas legi vian nomon.

A. K. en Olomouc. — Ni devas kalkuli laŭ tarifo. Cetere la prezoj kiujn vi nomas ne plu valoras.

H. A. R. en 's-Hertogenbosch kaj multaj aliaj. — Estonte ni ne plu informos per leterkesto pri la daŭro de ĉiono. Laŭ ricevota admonilo ĉiu povas kalkuli la laŭtarifajn daŭron (por vi ĝis 147).

J. A. en Skjelskor. — Post via pago de 20 kr. ni sendis al vi deziritan libron kun mankanitaj numerol. Se vi dume ne ricevis, ili ŝajne perdiĝis. Kio mankas al vi nun?

ARE en Novisad. — Dankon por fotografaĵo sendita antaŭ kelka tempo. Ni metos ĝin en nian albumon. Bedaŭrinde klišio nun kostas tro multe.

G. D. en P. — Via ironiema, senkaŭze malamikema kaj eĉ ofenda letero multe ĉagrenis min. Kiel tia tono? Tamen mi ne volas akcepti vian ofendon, certe vi estis laŭ ekaciitita, kiam vi skribis vian leteron. Vi parolas pri mia fratino. Jes, ŝi rakontis al mi kelkfoje pri vi. Nun ŝi troviĝas en Stockholm (Svedujo).

T. J.

Svis- kaj Finnlandanoj.

Denove ni atentigas pri ĉesigo de ponumera vendado post 1. aprilo. Se vi deziras daŭre ricevi ETan, bonvolu tuj aboni. (Kondiĉojn vidu sur la titolo de ET.)